
# BONA ESPERO



**Cirkulero 42** por la amikoj kaj subtenantoj
de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde, tel. +2573/626

Karaj amikoj kaj subtenantoj, Nordwalde, 95-05-09

jen la anoncita "freŝa raporto" de miaj familianoj, revenintaj de Bona Espero. Notu tuj: "Nenio ŝanĝenda en mia lastjara raporto" Tion diris mia edzo resume, do ankaŭ sessemajna restado kun travivo de la peza ĉiutago de Bona Espero neniel aperigis pravigeblon por la kalumnia kampanjo en 1993. Tamen li revenis kun ŝoka novaĵo: Ursula kaj Giuseppe GRATTAPAGLIA ŝatus retiriĝi jam jarfine de 1995, do post la lerneja jaro. **Se ni ne ĝis tiam almenaŭ havos kandidatojn por posteuloj, la lernejo devos esti fermata. Estus granda domaĝo por la tuta lando Goías, se la unuura internulejo nuliĝigus, ĉar ĝi estas la sola ŝanco por la kamparanoj, sendi siajn infanojn al la superaj klasoj. Ankaŭ paŭzigi la lernejon ne eblas: perdita ŝtata licenco malfacile rehaveblos.**

Sed nun aŭskultu la raporton de Rudolf:
Mi komencu per malgranda statistiko:
**Nombro de infanoj en "Bona Espero":** 32; en la lernejo: 31 + 3 najbaraj; krome 3 knabinoj (Marilda, Rosamira, Amanda) en Braziljo.
**Daŭre loĝas kaj laboras en Bona Espero:** Ursula kaj Giuseppe (gvidantoj), s-ino Aparecida (kuiristino), João SANTANA (laboristo).
**Klasoj:** 7 en 5 klasoĉambroj (+ biblioteko): 1a, 2a, 3a+4a, 5a+6a, 7a
**Instruistoj: Nivea** maldungiĝis. **Ada** (Adarci Ferreira) surprizis nin ĉiujn per bebo Igor (vidu la bildon), kiun ŝi naskis precize la tagon de nia alveno. Momente ŝi do ne instruas. Ŝi preferus eklogi en Alto Paraíso (vidu sube), sed resti instruistino de Bona Espero. La nova instruistino **Cristina** (Maria Cristina INÁCIO de OLIVEIRA, vidu la bildon) venas el Alto Paraíso kaj komencis sian laboron dum nia ĉeesto. Ŝi estas tre laborema kaj tuj eklernis Esperanton. Espereble ŝi restos! Krome venas regule la matematik-instruisto **Edinor** el Alto Paraíso kaj la najbarino **Iloni** por la instruo de la Portugala lingvo. Krome kompreneble Giuseppe kaj Ursula instruas, subtenataj foje de helpantoj.
**Portempaj helpantoj: Marian ŁUCZYWO** el Pollando restos ankoraŭ ĝis aŭgusto. **Trevor STEELE** el Aŭstralujo kaj **Anja ŚRODOŃ** el Pollando intencas, resti minimume 1 jaron.
Entute estas (kaj estis) tro malmultaj laborfortoj por venki la ĉiutagan laboron. Por teni la nombron de pli ol 30 infanoj (en la historio de Bona Espero longtempe estis malpli) Bona Espero bezonas pli da plenkreskuloj, daŭre loĝantaj tie.
**Novaj atingaĵoj:** La **digo de la akvorezervujo** estas parte fortikigita per betona muro. Ĉe la **elfluejo** estas ambaŭflanka ŝirma beton-muro kun malmuntebla simpla **ponto**; la infanoj povas nun sendanĝere iri naĝi. - La malnova ekstera lavejo estas renovigita. - La domo de instruistoj kaj helpantoj estas finkonstruita. - Dum nia ĉeesto ni helpis konstrui trotuaron malantaŭ tiu domo; krome malaltan muron, kiu ŝirmu la sportejon (vidu la bildon).
Tiuj rezultoj estas rapide raporteblaj; kiom da ŝvito kaj peno ili bezonis, ni helpintoj povas nun kredinde atesti. Vizitantoj nepre atentu, ke ili antaŭvidu sian kontribuon al la ĉiutagaj laboroj, ĉefe purigado, kuirado, vestlavado kaj vartado de la infanoj.

Por ŝpari bankkostojn, pagu laŭeble al UEA por la UEA-konto "bone-z",
sed informu nin, por ke vi pluricevu niajn cirkulerojn!
Se nek vi estas UEA-membro, nek UEA havas konton en via lando, ĝiru al jena
poŝtkonto: kontoposedanto "Bona Espero", D-48356 Nordwalde
Konto: 2033 99-465 Postbank Dortmund (bankkodo 440 100 46)

La **kurenta linio** inter Alto Paraíso kaj São George estas muntita, sed ankoraŭ ne ŝaltita. Bona Espero atendas nun sian konekson, esperehle ankoraŭ ĉi-jare, ĉar manko de kurento estas forte sentebla.
La Bonesperanoj dum mia ĉeesto faris jenajn kontraktojn:

- kun Brazila Esperanto-Ligo pri kunlaboro
- kun grupo de spiritistoj (**Ergon** kaj **Intira**), kiu intencas, fondi centron en Salto (3 km for de la domoj, sed ankoraŭ sur la tereno de Bona Espero); la laboroj jam komenciĝis.

**Perspektivoj, planoj:** Nia societo vaste publikigas en la Esperanto-medioj, ke ni serĉas posteulojn por Ursula kaj Giuseppe. En Bona Espero vivu 3 aŭ 4 "familioj": paro de plenkreskuloj - nepre Esperantistoj! - kun po 5 ĝis 8 infanoj. Inter la plenkreskuloj po unu devos ĉefe transpreni unu el jenaj postenoj: direktoro de la lernejo (laŭeble Brazilano), agrikulturisto, teknikisto, kuiristo (ĉar ne estas klare, ĉu s-ino APARECIDA restos), administristo (por organizi la havigon de provizoj kaj materialoj), librotenisto (inkluzive korespondadon).
Antaŭvideble estonte nek povos resti infanoj en Braziljo nek povos ekzisti 8 klasoj (pro daŭra manko de instruistoj). Se la lernejo entute restos, la problemo de la superaj klasoj estos solvebla jene: Bona Espero uzu la 8 parcelojn en Alto Paraíso, kiujn donacis la urbo (tamen kun kondiĉoj). Sur 2 el ili instruistinoj (Maria kaj Ada) povos konstrui (kaj pagi) siajn dometojn; sur 2 pliaj Bona Espero konstruu 2 pliajn dometojn por 1 "familio" kun pli aĝaj infanoj, kiuj vizitu la klasojn 6 ĝis 8 - kaj laŭeble ankaŭ 9 ĝis 11 - en Alto Paraíso (do, tiam 5 klasoj restu en Bona Espero). 4 parceloj restu en rezervo, se la urbo permesas tion; Bona Espero proponis al Brazila Esperanto-Ligo, konstrui Esperanto-centron tie, sed al BEL (ankoraŭ) mankas la mono.
La konstrulaboro por la dometoj de Bona Espero en Alto Paraíso komenciĝu en printempo de 1996a, sed ankoraŭ mankas libervoluloj, kiuj organizas kaj gvidas la konstruadon. Helpantoj certe pli facile troveblos.


Vidante tiun ĉenon de problemoj, "normalaj" homoj rezignus, sed ĉar Esperantistoj jam estas duonfrenezaj kaj la helpantoj de Bona Espero komplete frenezaj (la malhelpantoj des pli!), ni pluhavas "bonan esperon". Do, kiu rigardas en la spegulon aŭ ien ajn kaj tie trovas taŭgajn "frenezulojn", ili anoncu sin al ni por komune plufantazii pri detaloj.

La estraro de nia subtena organizo kunsidis la 6an de majo kaj aprobis alvokon, kiu iru al ĉiuj Esperantistaj gazetoj kaj radiostacioj. Nia societo kompreneble nun havas la aktualan problemon, ke ni plukolektas donacojn por projekto, kiu eble baldaŭ ĉesas ekzisti. Aliflanke, se ni nun abrupte finas la financadon, tiam jam nun ĉio kolapsus; do, tion ni ne rajtas fari, por ne forpreni la lastan ŝancon de la lernejo kaj de la infanoj. La estraro tial antaŭvidas: ĉiu kolektita mono eĉ post eventuala fermo de la lernejo estos elspezata por la pluklerigo de la infanoj. Ĉar la fondaĵo "Bona Espero" ankaŭ sen lernejo pluekzistus, eblus ekzemple, ke parto de la infanoj almenaŭ vivu en tiuj planitaj dometoj en Alto Paraíso kaj vizitus la urban lernejon. La plej aĝaj infanoj povus ankaŭ studi en aliaj urboj (ekzemple Braziljo, Formosa), helpe de nia mono. La instalaĵojn de Bona Espero Brazila Esperanto-Ligo povus transpreni kaj tiel savi por la Esperanto-movado.

Ursula profetis, ke la "bonintencaj ĉielaj fortoj", kiuj ĝis nun gardis Bonan Esperon kaj precipe la lernejon, zorgos por pozitiva solvo de niaj problemoj. Ni estraranoj klopodas, streĉi ĉiujn niajn fortojn por realigi la planojn de tiuj bonintencaj fortoj, eĉ se ni devus private kvazaŭ adopti kelkajn el niaj junaj geamikoj. (Ni tamen ne pripensas, translokigi infanojn al Eŭropo.)

La membrokunveno je la 27a de majo donos eblon, diskuti alternativojn. Findecidi jam nun, tamen ne eblas: ĉio dependos de la rezulto de nia alvoko, nome ĉu ni trovos (sufiĉe multajn) novajn gvidantojn por Bona Espero aŭ ne.

kun koraj salutoj




Lehrerin Ada
mit Söhnchen Igor

La instruistino Ada
kun sia fileto Igor



Cristina, die neue Lehrerin

Cristina, la nova instruistino



Die neue Stützmauer
um den Sportplatz

La nova mureto
ĉirkaŭ la sportejo